# *Ekspozicioj viziteblaj en la 9-a Salono de Nuntempa Kuba Arto*



**Salono de Nuntempa Kuba Arto**

La pasintan unuan de decembro malfermis siajn pordojn la  9-a Salono de Nuntempa Kuba Arto, la plej grava tiaspeca en la lando, kiu restos malfermita ?is 2024.

?i  trovigas en havana belega domo kaj enhavas  kvardek verkojn de simila nombro da artistoj, elektitaj el inter la cent projektoj ricevitaj el ?iuj provincoj de la lando.

Ili estas elmontritaj en la centra ekspozicio, kiu sub la titolo Hejmo, estis ina?gurita tiun saman tagon. ?is marto de la venonta jaro aldoni?os  kvar pliaj personaj ekspozicioj, kun la sama temo kaj elpensitaj de gasto- kuratoroj por Artis718 kaj JeffArtPlus galerioj, kaj aliaj; same kiel tri virtualaj en la Instagrama Nigra ?ambro.

Elmigrado, seksaj problemoj kaj mediaj problemoj estas la temoj plej traktataj de artistoj en ?i tiu eldono, kiu estis markita de rimarkinda malabundeco de rimedoj - anka? inkluzivitaj en la kuratoreca koncepto de

la evento.

En la evento elstaras anka? la inkluziva karaktero, kaj  kunekzistas ?iuj formoj de esprimo, stiloj, generacioj kaj arta trejnado.

Kvankam la programo ne konsideris okazigon de teoria evento, spacoj por disertacio estis malfermitaj per konversacioj kaj renkonti?oj kun la partoprenantaj artistoj kaj kuratoroj, kio rezultigas pli bonan alproprigon de la arta fakto fare de la kreintoj mem kaj de la publiko ?enerale.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/341496-ekspozicioj-viziteblaj-en-la-9-a-salono-de-nuntempa-kuba-arto

**Radio Habana Cuba**